

Eugen Roth,  
Lokofobio

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En trajno, sub la lum' ampola,  
jen sidas iu homo sola.  
Moderna estas la vagono  
kaj multe kostis ĝi da mono.

Cent sido-lokoj vakas tute,  
petegas pri eksido mute.  
Nur havas sencon pleno trajno,  
ĝi estas de l' fervojo gajno.

Sed la malplena trajno restas  
senhoma, kiel ĝi nun estas.  
De l' nokto mezo jam alvenas,  
fantome sin la trajno trenas!

La hom', de timo jam pelata,  
de l' lok' ekstaras okupata,  
eksidas tie ĉi ka tie  
kaj ĉirkaŭiras malracie.

La hom', aliujn ŝajniganta,  
ekkonas, ke ĝi estas vanta,  
ekploras ege pro malĝojo,  
pro kompatemo je l' fervojo.<sup>2</sup>

...

---

<sup>2</sup>aŭ:  
pro kompatag' al la fervojo.  
aŭ eble:

*Traduko de la Germana poemo "Platzangst" de EUGEN ROTH (\*1895-01-24 – †1976-04-28) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-06.*

*MR-066-2c / Arg-512-1007 (2010-02-18 07:14:15)*

---

pro kompatig' je la fervojo.

<http://www.poezio.net/version?poem-id=512&version-id=,1007>